




ESPERANTO EN AFRIKO

uea.org/asocio/komisionoj/afrika_agado

Oficiala Bulteno de la Afrika Komisiono de UEA | 18-a jaro, n-ro 51, de oktobro 2024

ENKONDUKO

Karaj legantoj,

Ni sincere petas vian indulgon pro malfrua aperigo de tiu ĉi numero !

Kiel vi ĉiuj scias, nia pleja prioritato ĉi-jare estis la efektiva sukcesa okazigo de la universala kongreso de esperanto en Aruŝo/Tanzanio. Tio ja kaptis nian atenton kaj foruzis nian tutan tempon, kiel Afrika Komisiono de UEA unuafoje gastiganta la tute unuan tian mondiskalan eventon, ni decidis dediĉi nian maksimuman tempon al kunorganizado de tiu multevalora kongreso kaj poste reveni al nia oficiala informilo kun sufiĉe multe da inform-riĉa, interesega numero.

Karaj, pasis kelka tempo post la Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, espereble ĉiuj kongresintoj jam hejmen alvenis kaj jam pretus rakonti al konatoj kio okazis aŭ kion ili spertis dum la universala kongreso en Aruŝo; kaj tiuj, kiuj ne povis veni ankaŭ nun scivolemus legi informojn pri tiu unua UK en Afriko.

Ni ĝojas venigi al vi ĉi tiun novan numeron de nia revuo Esperanto en Afriko (EeA). En ĉi tiu numero vi multon legos pri la ĵus okazinta tute unua universala kongreso de esperanto en Afriko, nekrologajn informojn, diverstemajn artikolojn de afrikaj aktivuloj pri okazintaj esperanto-eventoj, novajn nomumojn de elstaraj afrikaj aktivuloj ene de la esperanto-movado kaj novajn iniciatojn de aktivuloj tutafrike.

La redakcio

GRANDA SUKCESO



Kvankam pli ol cent jarojn aĝas la esperanto-movado kaj ke esperanto atingis Afrikon jam pli ol dudekon da jaroj antaŭe, ankoraŭ restis la plej granda revo de ĉiuj afrikaj esperantistoj : iam gastigi la universalan kongreson de esperanto en sia hejmkontinento, Afriko.



Ja veras, ke tiu revo ŝajnis pli kaj pli ne realigebla pro la kondiĉoj rilate organizadon de tia kongreso unue pro sekureco kaj due pro la homrajte ligitaj postuloj. Ĉiam leviĝis ŝtala bremsa al tio, kion la afrika esperantistaro aspiradis. Ne nur tio estis la ĉefa problemo, sed ankaŭ la apokrifaj asertoj pri persona sekureco en Afriko. Veras, ke la eksterafrikaj informiloj sporade elsendas informojn, kiuj

favoras Afrikon, ofte aperigante timigajn informojn; sed tamen, la heroaj esperantistoj ĉi-foje sukcesis trafakasi tiun barilon kaj, por iuj unuafoje, sukcesis veni al Afriko alportante la veran egaligan valoron en nia esperanto-movado, kion afrikanoj rigardis kun profunda vorte nepriskribebla raviteco.

Ni ege bedaŭris pro ĉio malbona okazinta al iu ajn dum la unua universala kongreso en nia kontinento, ja iajn okazintaĵojn ni tute ne kapablis evitigi al vi ĉar estis super nia homa povo, sed ni certe klopodis kune kun la Loka Kongresa Komitato gastigi vin



en la kiel eble plej sekuran lokon. Ni sendube esperas, ke vi ĝuegis vian restadon en Aruŝo kaj ĉirkaŭe, la ekskursejoj estis pitoreskaj, vi certe ĝuis ilin. Ni tre esperas, ke vi aprezis la akompanadon ekskurseje de niaj gejunuloj, spertis kiom rege ili primajstras la lingvon, ĉu ne ? Sendube ĉar la 109a UK estis la plej junulara en la historio de la esperanto-movado.

Neniun kazon pri molestado ni registris, tio pruvas, ke ĉiuj kongresanoj trankvile, pace, ĝoje kaj spirante puran aeron kongresis en Tanzanio.

Sendube, kiel Afrika Komisiono, ni esperas plenrajte ankoraŭ ne atendi denove dum jarcento por povi denove okazigi la Universalan Kongreson. Tia

sinteno kontribuas al paco-konstruado, estas konsciigo, ke Afriko meritas tute alian konsideron ol antaŭ ducent jaroj. Ni finas ĉi tiun mesaĝon dankante ĉiujn kongresintojn kaj aparte UEA-n pro ties decido pri unua UK en Afriko kaj esperas revidi vin en Afriko iam ajn.

La Afrika Komisiono de UEA

VIRINA KONGRESO EN ARUŜO/TANZANIO

DUA AKVoj

Temo: “Virinoj, leviloj de daŭrigebla disvolviĝo”



EVAA organizis tiun virinan kongreson, kiun ni nomas AKVoj aŭ Afrika Kongreso de Virinoj. Akvo estas neevitebla elemento en la homa vivo. De ĝi fontas vivo kaj ĝi estas la vivo-bazo de ĉiuj kreitoj. Virinoj estas kiel akvo, la fonto, el kiu fluas generacioj. La dua AKVoj, kiu okazis en Aruŝo de 31a de julio ĝis 1a de aŭgusto 2024, kunvenigis ĉirkaŭ 60 partoprenantojn el Belgio, Burundio, Ĉinio, Francio,

Gambio, Kenjo, DR Kongo, Koreio, Madagaskaro, Rumanio, Svislando, Tanzanio, kaj Usono.

Nia kongresa temo montras, ke virinoj estas leviloj de daŭri-pova disvolviĝo. Nia celo estas investi en la subtenado kaj trejnado de virinoj kaj tio montras disvolvigan levilon por lando kaj kontinento. Tiu ĉi aranĝo, kiu reliefigis la decidan rolon de virinoj en Esperanto-movado, estis vera festo de virina engaĝiĝo kaj solidareco ene de Esperanto-komunumo.

La partopreno de virinoj havas valoron en nia socio, negrave kie ajn ili loĝas aŭ en kia ajn kampo ili estas. Ju pli da virinoj estas entreprenistoj en siaj landoj, des pli kreskas ilia ekonomio, des pli reduktiĝas ilia malriĉeco kaj tio estigas ilian daŭrigeblan evoluon kaj disvolviĝon. Ni certas, ke edukado kaj trejnado estas la sola longedaŭra solvo, kiu ebligas al ni kuraĝigi knabinojn kaj virinojn eniri la edukan kampon.

Sekve, gravas doni oportunecon kiel ĉi-tiun kongreson al virinoj, por povi provizi al ili diversajn trejnadajn, ekspluatante iliajn talentojn kaj kundividante kun ili novajn spertojn. Ĉi tio estas farita por atingi nian celon pri daŭri-pova disvolviĝo.

Nia programo

Prelegoj kaj kundividoj



Sub nia temo, la partoprenantoj havis la okazon interŝanĝi ideojn kaj perspektivojn pri la graveco de Esperanto kiel ilo por egaleco kaj interkultura interkompreniĝo. La intervenoj de prelegantoj, el diversaj profesiaj kaj kulturaj fonoj, traktis diversajn temojn kiel instruadon de la lingvo al infanoj, la rolon de virinoj en la disvastigo de Esperanto, la problemojn alfrontitajn de virinoj en la movado kaj la efikon de Esperanto al virina emancipiĝo.

Unue, ni sekvis la prelegon pri nia kongresa temo. Pritraktita en ĝi estas temo pri la identeco de virinoj, iliaj rajtoj, iliaj malfortoj kaj fortoj, iliaj respondecoj, iliaj agadoj por igi ilin efikaj iloj por disvolviĝo. En la fino de tiu prelego, ni rigardis tion, kion ni faras por ke virinoj estu leviloj de daŭrigebla disvolviĝo: detruu sociajn kaj kulturajn barojn, permesu la aliron al edukado kaj dungado kaj zorgu pri la sano kaj bonfarto. Nia kuraĝiga frazo: "**Ne timu ŝanĝi por ŝanĝiĝi**". Due, ni havis alian prelegon, kiu klarigis al virinoj ke, lerni estas unu el iloj por disvolviĝo. Virinoj havas motivon lerni kaj studi por antaŭeniri. Trie, ni ricevis la prelegon kundividi spertojn de usona virino kaj virinajn spertojn el Kinŝaso. Sekve, ni havis tempon por aŭskulti prelegon pri virino por paco. La granda ideo en ĝi temas pri virino, kiu devas vivi pace por provizi pacon al siaj ĉirkaŭantoj. Ankaŭ grava temo de la kongreso estis genra egaleco: virinaj rajtoj, virina povo. Se ĉiuj respektas homajn rajtojn, neniu vivas sub perforto. Lerni pri starigo de simpla projekto fermis la prelegon. Ni instruis al ĉiuj partoprenantoj la elpaŝojn por starigi projekton kaj difini buĝeton.

Lernado de dancoj, artaj atelieroj, plivigligado kaj lingvoinstruado kaj ekskurso



La kongresa programo estis riĉa je praktikaj labor-renkontiĝoj, kiuj iris de artoj ĝis metio-lernado, ebligante al virinoj enspezi monon per siaj propraj iniciatoj. Malfermaj diskutoj ankaŭ esploris la malhelpojn alfrontatajn de virinoj kiel lernantoj kaj praktikantoj de Esperanto.

Ĉiuj partoprenantoj kunlernis rumba-on, la tradicion dancon de DR Kongo kaj zumba-on, la novan dancon. Ĉiuvespere, ni sekvis la internacian vesperan

kulturon. Virinoj el ĉiuj landoj prezentis siajn kulturojn: scenetojn, kantojn, dancojn, rakonton, ktp.

Artaj atelieroj: voĉo-teknikoj, pentraĵoj, perlaĵ sakoĵ, ĉapeloj, orelingoj, pneaj/ledaj sandaloj, transformado de frukto-konfitaĵo plivigligis nian kongreson. Ankaŭ instruado de Esperanto okazis. Ni laboris grupe por ekzerci kaj paroligi lernantinojn.

Ni ricevis gvidadon pri kiel instrui esperanton al infanoj. Ni havis ekskurson en la tria tago. Ni vizitis du lokojn: la Masajan Merkaton kaj la centron de afrika kultura heredaĵo.

Inter la eminentaj invititoj de la kongreso estis Duncan CHARTERS, la prezidanto de UEA kaj lia edzino Cecily LEE. Estis lanĉita ideo por la kreado de internacia reto de esperantistaj virinoj, celante subteni kaj antaŭenigi lokajn iniciatojn samtempe plifortigante la ligojn inter virinoj engaĝiĝintaj en la movado. Tiu ĉi alvoko estis varme bonvenigata de la partoprenantoj, kiuj esprimis sian deziron nutri kontakton kaj kunlabori trans landlimoj.



La virina kongreso estis momento de inspiro kaj plifortigo de ligoj. La partoprenantoj disiĝis pli motivitaj kaj entuziasmaj per novaj ideoj por diskonigi Esperanton ne nur kiel lingvon, sed kiel veran ilon de egaleco kaj emancipiĝo. Dum la esperantista movado daŭre evoluas, la rolo de virinoj ene de ĝi montriĝas pli kaj pli decida ol iam ajn.

Ĉiuj partoprenantoj sentis, ke la etoso estis tre amuza kaj ĝoja, tre varma, amika kaj paca. Ĉiuj estas fieraj de nia lingvo Esperanto. Ĉiuj partoprenantoj kunvivis amike kaj pace en tiu kongreso. Ĉiuj partoprenantoj pretas agadi revenonte en siaj urboj kaj landoj.

Tiu virina kongreso okazis danke al la subteno de nia UEA-estraro, de ESF-estraro kaj de ILEI. Do, ni tre dankemas ĉiujn, kiuj subtenis ĉi-tiun virinan kongreson kaj ni tre dankemas ĉiujn, kiuj partoprenis. Vi montris, ke ni ĉiuj estas kunlaborantoj kaj subtenas unu la alian por disvolviĝo. EVAA estas ĉiam preta por ajna kunlaborado. Multajn dankojn al ĉiuj!

Rev Dr MIORA RAVELOHARISON

UNUAJ TAGOJ DUM UK EN ARUŜO

La unuaj UK-tagoj estis tre impresaj por afrikanoj! Kun la unufojaj kongresanoj el malsamaj afrikaj landoj unuafoje havantaj la oportunon esperantumi inter multe

da homoj el malsamaj kontinentoj, junuloj ĉefe komencantoj balbutante baraktis esprimi siajn ideojn al novaj konatoj.

Ne sciante kion fari, iradis tien kaj reen, foje sole surkorte staris atendente siajn konatojn. Tio soleco regis ĝis kiam tempis viciĝi por ricevi manĝ-kuponojn tute ne sciante por kio tiuj kuponoj servas. Envice staris en grupetoj homoj venintaj el sama regiono elradiante la deziron ekkonatiĝi kun la aliaj, kiuj ĉirkaŭe staris. Ŝercoj, aligatorado kaj krogodilado, ...

Poste venis momento kiam ĉiuj devus esplori la kongresan libron. Iom voluma,



certe unuataĝe ne ĉiuj kuraĝis foliumi ĝin, nur kelkaj, ĉefe tiuj, kiuj havis programerojn. Mi konstatis ĉe la lipoj de multaj parolemon, sed ne sukcesis kapti la okazon ĉar la pleja alcelito estis ekster-afrikano. Ĝenerale la kongresanoj estis amikemaj, babilemaj, ridetadis, ... La jam kutimaj kongresanoj ekis esplori la salonojn en la konstruaĵo dum la unuafojaj ne sciis kion fari ĝis post du tagoj kiam ili estis alkutimiĝintaj al la situacio.

Kiel plurjara esperantista instruisto, estis mojose por la unua fojo renkontiĝi kun miaj ĝelernantoj. Kion fari estis la ĉefa demando de la unuafojaj kongresanoj. Venis la solena malfermo de la 109a universala kongreso de esperanto en Aruŝo kaj tiam komenciĝis la tuta semajna etoso.



LA SOLENA MALFERMO

La solena malfermo de la malfermo de la 109a universala kongreso de esperanto estis sukcesoplena kvankam la iuj asertis, ke ĝi estis ĥaosa nur pro la malfruo de la Ministro de naturaj rimedoj kaj turismo, laŭ la opinioj de multaj afrikanoj tiu argumento ne konvenas en tia situacio, ĉar la ĉeesto de tiu Ministro honoris la kongresanojn kaj plivalorigis kongreson. La prelegoj de la tanzaniaj aŭtoritatoj elradiis la ravitecon, ĝojon kaj honoron esti kiel la unua afrika lando gastigi tiun elitisman prestiĝan tutmondan esperantistan eventon. Estante lando kun multaj vidindaĵoj, la tanzaniaj aŭtoritatoj invitis ĉiujn ĉeestantojn rekonsideri ties decidon reviziti tanzanion kaj denove rekongresi en tanzanio.

AFRIKANOJ KAJ PROGRAMEROJ

Dum la 109a universala kongreso de esperanto en Aruŝo, evidentiĝis, ke multaj afrikanoj ankaŭ partoprenis la en diversaj programeroj la interesiĝeco kaj ankaŭ animis kelkajn programerojn interalie la instruado de esperanto al progresintoj al komencantoj, instruado de la svahila lingvo, muzikado, teatraĵo, kaj intervenis ankaŭ en aliaj programeroj.

Instruado de la svahila

Tiun programeron gvidis s-ro Charles kiu instruis la svahilan al multaj gekongresanoj. Ĝi estis sufeĉege adaptita kurso por povi en malmulte da tempo paroligi la lernantojn. Aldoniĝis al tiu programero kiel instruisto s-ro Espoir Ngoma Kasati kiu dum kelkaj lastaj tagoj ankaŭ interhelpis per la isnuado. Fine de la tiu programero

estis organizita "Lingva defio" dum kiu kandidatoj kiuj lernis la svahilan rete per uTalk kaj tiuj, kiuj eklernis ĝin ĉeeste dum UK. La parola testo konsistis el kelkaj rutinaj demandoj konsierante la fluecon kaj la vortoprovizon de la ekzamenito. Partoprenis...

Kurso por progresintoj

Dum tuta uk-semajno Mirejo Grosjean kaj Aŭrora Bute ofertis la propedeŭtikan kursojn al pluraj esperantistaj instruistoj por ke tiuj lastaj povu akiri kapablon,

metodologian en la instruado de esperanto. Pro tio estis organizita dumsemajne plurtemaj kursoj kaj ĉeestis ilin la instruistoj. Honore estis invitata s-ro espoir Ngoma Kasati por unutaga kurso pri la instruado de la sufiksoj -iĝ- kaj -ig-.

La du eminentaj instruistinoj observis la junan instruiston kaj fine de la kurso venis korektigaj recenzoj. Tiu kursaro donis al la instruistoj tute novan metodologion kiuj multe helpas al instruisto ne deflankiĝi el sia kursotemo kaj daŭre kapti la atenton de lernantoj.

PAROLI LANGOLE

Dum la 109a UK okazis kurso pri la langola stenografio en la kadro de la kongresa temo pri lingvo. Ĝin prezentis s-ro Martin Strid el Svedujo. Tiu stenografio estas dividita en urĝuskloj, mususkloj....

Ĉi tie ni volas substreki la mususklojn kiuj konstatas el po unuopa simbolo por ĉiuj literoj kaj unu simbolo por ĉiu vorto. Tiun stenografion oni povas uzi en ĉiu lingvo kiun oni regas kaj estas rapidskribo kiun oni povas uzi en diversaj kunvenoj kiam necese. Jen ekzemploj de la langolaj rapid-skriboj. Okaze de lern-bezono bonvolu kontakti la redakcion por interrilatigi vin kun la inventisto de tiu rapidskribo.

Artikolo pri langolaj minuskloj

Ni scias ke jam antaŭ dumil jaroj ekzistis en Romia Imperio skribo rapida, tiel nomata "Tironaj notoj". (Per ili dokumentiĝis kelkaj famaj paroloj de antikvaj herooj). Ili ja ne havis surbendigilojn kaj apenaŭ konis elektron.

Antaŭ ducent jaroj, germano Gabelsberger inventis rapidskribon kursivan. Tio signifas ke la skribsignoj deklivas laŭ la naturaj movoj de skribanta mano. Post lia, dum la deknaŭa jarcento venis pluraj kursivaj sistemoj, ankaŭ tiu de Melin, kiu fariĝis norma en Svedujo.

Junulo mi cerbumis pri skribmanieroj kaj faris unun kies signoj montras per siaj aspekt'er'oj po fonetikan apartenon, ekzemple ĉu ĝi estas voĉa aŭ senvoĉa, nazala aŭ ploziva, lipa aŭ vela kaj tiel plu. Ĝi estis iom rapida, sed ne vere

stenografia. Mi ne bezonis ĉiujn lingvosonojn ĉar uzis ĝin precipe por la sveda kaj la internacia lingvoj. Sed mi pensis ke, per sia "rekta" kaj facila rilato inter aspekto kaj sono de ĉiu signo, ĝi estis "kulture neŭtrala". Nomas mi ĝin "langolaj" literoj, ĉar laŭ la lango.

Komencis ĉi jarmilo mi lernis Melinan stenografion, memstare, per iu malnova instru'kajero. Daŭris tri semajnojn da libertempaj (postlaboraj) horoj. Poste mi devis nur ekzerci por fariĝi lerta kaj pli rapida skribanto.

Tre bona ĝi estas por noti la svedan, sed mi bezonis ion por pli da lingvoj. Do mi transfaris ĝin laŭ la principoj de langolaj literoj kaj iom pli ampleksa por kovri ĉiujn sonojn de Internacia Fonetika Alfabeto. Fakte, per sia "matematika" reguleco ĝi havas eĉ pli da sonoj ol tie troveblas. Mi nomas ĝin "langolaj minuskloj" kaj la malnovaj do fariĝis "langolaj runoj".

Dum pluraj jaroj, mi pli ol dudekfoje transfaris la sistemon por ke ĝi estu pli facila por skribi, klara por kompreni (legi) kaj logika laŭ fonetiko kaj la plej oftaj son(kombin)oj havu la plej simplajn signojn. Tio pli-malpli pretis antaŭ (preskaŭ) dudek jaroj.

Ĉi sube vi povas vidi nian espan himnon (En la mondon venis nova sento...) per langolaj minuskloj. (Rimarku ke havas la poemo strofojn ses, kiujn parigas ĝia kutima melodio himna).

(BILDO LANGOLE: '1. En la mondon... , '2. Ne al glavo...)

Normale oni ne bezonas la horizontalajn skribliniojn, ili estas nur helpo por lernantoj.

Cirkloj estas malgrandaj [l] kaj [r] kaj duonalta [s] (samdirekta kun [l]).

Multa konsonanto deklivas krute, ekzemple [d], [t], [g], [k] kaj duoble alta [ɖ] (= ĝ), sed ortiĝas kontraŭ la skriblinio se sekvas sian nazalon, do kiel [nd], [nt], [ŋg], [ŋk] kaj [ndʒ].

(BILDO LANGOLE: '3. Sub la sankta... , '4. Forte staras...)

Laŭ bezono de ĉiu unuopa lingvo konsentebblas por ĝi urĝ'uskl'oĵ kiuj eĉ pli rapidigu la skribon. Urĝusklo estas signo, kies "minuskla sonon" tiu lingvo ne uzas. Do tiu signo povas signifi ion alian, ekzemple oftan vorteron, vorton aŭ eĉ tutan frazon. Inter unuaj urĝuskloj espaj estas ejektivaj minuskloj [k'] por esp'urĝusklo [sk], [p'] por [sp] kaj [t'] por signifi sonon [st]. (Ejektiva minusko estas duoble pli alta ol samloka plozivo senvoĉa, sed same komenciĝas kaj same finiĝas). Tiuj samaj urĝuskloj povas konveni ĝenerale por lingvoj kiuj ne havas ejektivon.


(BILDO LANGOLE: '5. Sur neŭtrala... , '6. Nia diligenta...)

Ni havas ankaŭ ĉiajn interpunktojn, ciferojn, matematikajn signojn kaj pli. *Pri tio vi povas legi je ...**(RETEJO)**...*


Dankas pro via atento

Martin Strid


Jen la langole skribitaj strofoj de la esperanta himno



1a kaj 2a strofoj



3a kaj 4a strofoj



5a kaj 6a strofoj

JUNULARA PROGRAMERO DUM UK EN ARUŜO



Kiel tradicie, dum la UK en Aruŝo okazis la junulara programero. Danke al la multnombra partopreno de junuloj el afriko, la junulara programero havis

multajn partoprenantojn. Okazis eta miskompreno pro tradicia diferenco!

La junulara programo okazis en ZEZE, trinkejeto iom for de la kongresejo. La horo elektita ne estis taŭga por multaj afrikanoj kiuj kutimas frue enlitiĝi. Relative sekura, la urbo neniel influis la malfortan partoprenon de afrikaj junuloj sed ja la renkontiĝ-tempo. Ni, la organizantoj de tiu programero forgesis, ke afrikanoj frue enlitiĝas, tio estas deca konduto de ĉiu bone edukita junulo. Kio signifas, ke ne ĉiuj povas elteni maldormon ĝis malfrue nokte, normala malfruo estas ĝis horo antaŭ noktomezo. Tamen la etoso en ZEZE ne forvelkiĝis pro tiu malforta partopreno. Kun la vekigema voĉo de Michel Boris Mandirola farante gravajn anoncojn, kun muziko kaj dancado, alveno de aliaj kongresanoj maljunuloj plivivigis la etoson. Krom tiunokta programero, estis organizitaj aliaj junularaj programeroj kiel urba ludo, mukis

junuloj kaj pluraj aliaj, kiujn noti ne eblas, sed certe estis sukcesoplene. La programero pri tejo sin prezentas okazis en Via Via diskejo, kiun partoprenis pli ol deko da junuloj. La vicprezidanto de tejo Sneha Venkatesh kaj la ĝenerala sekretario de tejo KuboF Hromoslav prelegis esperante kaj Espoir Ngoma Kasati tradukis al la svahila por komencantoj. Estis la plej unua fojo kiam amaso da junuloj eksciis pri tejo kaj diversaj projektoj kaj programoj de tejo. La celo estis ja informi la junulojn pri tejo kaj alproksmigi ilin al la agado de tejo.

Foje okazis, ke ne ĉiuj junuloj povis partopreni la junularajn programerojn pro tio, ke ĉiutage estis ekskursoj kaj junuloj ĉiam iris kiel interpentistoj kaj ĉiĉeronoj. Fine, ĉeestintaj reprezentantoj de landaj sekcioj de tejo prezentis siajn sekciojn kaj rakontis pri ĝenerala enlanda agado kadre de tejo.



RAPORTO PRI LA 54A INTERNACIA INFANA KONGRESO



La internacia infana kongreso IIK okazis en Tanzanio, en Aruŝo, de la 40-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024, kaj ĝi estis semajno plena je edukaj kaj amuzaj eventoj, kiuj lasis profundan efikon sur ĉiuj partoprenantoj.

Partoprenis 32 infanoj, inter ili 20 adoleskantoj el Tanzanio kaj 12 etuloj el divesaj landoj : Kongolando, Madagaskaro, Tanzanio kaj Usono. La kongreso komenciĝis kun amuzaj ludoj, kiuj havis la celon helpi la infanojn konatiĝi unu kun la alia en interaga maniero. Tiuj ludoj estis variaj, inkluzive de motivigaj kaj kunlaborigaj aktivadoj, kiuj instigis la infanojn al interŝanĝo kaj interkompreno. Ĉi tiuj komencaj ludoj ne nur rompis la glacieron, sed ankaŭ kreis amikajn ligojn inter la infanoj, kio estis grava por la sukcesa progreso de la semajno.

Unu el la plej interesaj kaj edukaj eventoj estis la trezor-serĉado, kiu estis organizita ĉirkaŭ la kongresejo. La

serĉado estis planita per spuroj en esperanto, kio havis duoblan efikon : ĝi helpis la infanojn esplori la ĉirkaŭaĵon kaj ankaŭ plibonigis iliajn lingvajn kapablojn. La uzo de esperanto en ĉi tiu agado en nur aldonis unikan lingvan dimension al la kongreso sed ankaŭ stimuli la infanojn en sia lernado de nova lingvo en praktiko kaj amuza maniero.

Ĉiutage dum la kongreso, infanoj partoprenis en rakontado de rakontoj



en esperanto, kiuj estis ilustritaj per belaj bildoj. Ĉi tiu aktivado celis por plibonigi la prononcon de la infanoj kaj ankaŭ por ensorĉi ilin per edukaj rakontoj, kiuj enhavis kulturajn

elementojn. La infanoj ankaŭ havis la ŝancon legi rakontojn, kio helpis ilin praktiki sian legadon kaj paroladon dum la belaj bildoj stimulas ilian imagad-povon.

La projekcio de desegno-filmo en esperanto estis alia parto de la programo. Tiuj filmoj ne nur amuzis la infanojn sed ankaŭ edukis ilin samtempe plifortigis iliajn lingvajn kapablojn. La filmoj estis atenteme elektitaj por esti amuzaj kaj instruaj, kio helpis la infanojn lerni en neformala kaj ĝoja etoso.

La mateno estis dediĉita al diversaj



fizikaj aktivadoj. La infanoj partoprenis en pilkludoj, dancoj, kantoj kaj aliaj kolektivaj ludoj. Ĉi tiuj ludoj ne nur instigis fizikan aktivecon sed ankaŭ stimulis teaman laboron kaj amikecon inter la infanoj. La fizika aktiveco ankaŭ helpis plibonigi la sanon kaj bonfarton de la infanoj, kio estis esenca por la ilia ĝoja partoprenado en aliaj agadoj.

Merkrede, la infanoj havis la oportunon ekskursi al la Nacia Parko de Aruŝo. Ĉi tiu ekskurso estis gvidata kaj la infanoj esploris la naturan belecon de la aero observante la lokan faŭnon kaj florojn. La ekskurso ne nur donis al la infanoj

la ŝancon vidi la mirindan naturon de tanzanio, sed ankaŭ inkludis edukajn elementojn pri la loka medio, homaj evoluoj kaj la bestoj, kiuj estas unikaj al la regiono.

La lasta tago de la kongreso estis dediĉita al kreemaj aktivadoj. Infanoj partoprenis en desegna ateliero, kie ili kreis diversajn desegnaĵojn. Ĉi tiuj desegnaĵoj ofte temis pri naturo, paco ka amikeco permesante al al infanoj esprimi siajn sentojn kaj pensojn artistike. Poste, la infanoj prezentis teatraĵon pri protekto de la arbaro. La teatraĵo estis kreita kaj prezentita de la infanoj mem, inkluzivante kreatajn scenarojn kaj kostumojn, kiuj ankaŭ estis faritaj de la infanoj. La celo de la teatraĵo estis altiri atenton al la graveco de media protekto kaj la prezentado montris la talenton kaj engaĝiĝon de la infanoj en la temoj de medio kaj konservado.

La kongreso finiĝis per vigla danco kiu alportis amuzan kaj festan atmosferon al la evento. Ĉi tiu danco ne nur markis la finon de la kongreso, sed ankaŭ festis la sukcesojn kaj amikecojn kiuj kreiĝis dum la semajno. Speciala aludo estas por la infan, kiu antaŭ la kongreso estis timema kaj malfermita al malmultaj. Dum la semajno, post la konatiĝaj ludoj kaj subteno de la organizantoj, ŝi malfermiĝis aktive partoprenis en diversaj aktivadoj kaj montris grandan progreson en sia memfido. Ĉi tiu evoluo estis vere inspira kaj ilustris la pozitivan influon de la kongreso sur la individuaj evoluoj de la infanoj. Plej multaj el la

partoprenantoj estis komencantoj en diversaj aspektoj de la programo, sed la dediĉo de la organizantoj al instigado kaj subtenado kaŭzis, ke la kongreso ne nur edukis kaj amuzis la infanojn, sed ankaŭ helpis al ili disvolvi novajn kapablojn kaj memfidon. La kongreso

rezultis sukcesan kaj memorindan eventon, kiu havis profundan efikon sur ĉiuj partoprenantoj.

**Ranja Lydie ZAFINIFOTSY,
zorgantino de IIK**

VIZITO ĈE MASAJA VILAĜO



Merkrede, 7an de aŭgusto 2024 ĉiuj kongresanoj ĉu iris al ekskursoj aŭ restis en siaj hoteloj tutan tagon ĉar estis tago sen programo. Nia ekskurso kun pli granda nombro da kongresanoj estis vizito ĉe masaja vilaĝo

LENGIJAVE (lengiĝave), relative norde de Aruŝo.

En busa karavano de la ICC-centro kunbusis al tiu vilaĝo, post almenaŭ duonhora veturado ni alvenis al tiu vilaĝo kiu portas la nomon de apuda alta monto. Buse soriris monteton kiu estas la ĉefa regiona masaja paŝtejo kaj buĉejo, nin gastigis ĥoroj da dancantaj kaj kantantaj masajaj virinoj unuflanke kaj aliflanke en rondo alten saltantaj gejunuloj kantante sur la pinto de la

monteto. La buĉejo estas konstruita per fera barilo, kie Masajoj marĉandis tipe masajajn ornamaĵojn, vestaĵojn, kuracaĵojn kaj mangaĵojn, ni regalis nin per ĉio.



Tuj apude plenkreskaj masajoj rostis bovaĵon en tipe masaja stilo. Venteto blovis polvon kaj fumon de la fajro. Post momento, venis la masaja Estro kiu en aŭtoritata tono klarigis al ĉiuj gastoj la diversajn partojn de la bova viando kaj kiel dispartigi ĝin tio estas ke ĉiu parto havas kategorion da homoj kiuj ĝin manĝi rajtas. La masaja Ĉefo parolis majase, alia masaja viro klarigis svahile kaj Mramba Simba tradukis al esperanto.

Dume masajaj virinoj sidis surgrunde for de tiu loko, tio signifas ili ne rajtis alproksimiĝi kie viroj estas sen rajtigo fare de viroj. Notindas, ke la masaja



kulturo ne estas tolerema kaj estas tre strikta kiam iu kontraŭmore agas. Post longega klarigado, la masaja Ĉefo levprenis parton de la bova viando destinitan al ĉefoj kaj transdonis ĝin al

la Prezidanto de UEA bonvenigante lin. Poste ni iris sidi en tendojn. Ĉiuj esperantistoj ricevis po pecon da viando destinitan al gastoj.



Estas necese noti, ke tiun viandon oni ne salis, ĉar la viando en si mem entenas salon (laŭ masaja aserto); do ni manĝis bongustan sensalan viandon. Post formanĝi la porgastan viandon, nin invitis la Masajestro en la masajan tute apude malsupre de la monteto por sperti pri masaja vivstilo. En granda polvo, ni paŝis al la masaja loĝejo, kie ni spertis eksterordinaran riĉan tradicion de masajoj de ili gardatan dum jarcentoj.

Masajoj montris al ni kiel siaj junuloj trovas korpan energion : temas pri trinkado de varma bova sango. Venigita estis sana bovo, junulo ĉirkaŭŝnuris ĝian kolon por trovi vejnon kiun oni



devis trabori per sago. La unua provo trabori la vejnon de la kolo de la bovo estis malsukcesa, venigis junuloj duan povon kaj post spertula sago-pafo, borita estis la vejno, elŝprucis sango

kiun ĉerpis per kalebaso masajoj kaj laŭvice ektrinkis.



Ĉiuj trinkintoj asertis, ke la sango estis bongustega! La sangon trinkis ankaŭ esperantistoj el Afriko kaj Eŭropo elprovante. Eblas konservi tiun sangon multe pli longe kunmetante ĝin kun bova lakto. Estis memorinda spektaklo, poste ni resoriris la monteton, kie tiam estis preparitaj tipe masaja manĝo kaj trinkaĵo : mi tre ŝatis la sensukeran loŝoron (miksaĵo de lakto kaj senĉeligita malmoligita maizo); necesas scii, ke bova lakto kaj sango estas la ĉefa nutraĵo de Masajoj aldone al viando.



Resurmontetiĝinte, estis tempo por diversaj prelegoj de Tanzaniaj aŭtoritatoj, masajoj kaj esperantistoj; transdono de premioj : Francesco Maurelli danke al sia brila laboro ekde la komenco de la preparoj de tiu 109a UK ludis gravan rolon por la partoprenigo de Afrikanoj al UK kaj organizis diversajn seminariojn kapabligajn en Aruŝo antaŭ la kongreso tial la masaja Estro donis al li masajan nomon "FORDUNI", signifante personon al kiu oni kuras por solvi diversajn problemojn honore al lia granda laboro en la sukcesigo de tiu ĉi kongreso. Prelegoj, kantoj, dankoj estis tre multaj kaj interesaj kun la helpo de SIMBA MRAMBA kiel tradukisto de la svahila al esperanto kaj de esperanto al la svahila.

SOLENA FERMO

La solena fermo okazis en salono Zamenhof la 10an de aŭgusto. Necesas noti, ke por la prezidanto de UEA Ducan Charters ne valoris la penon surpaperigi sian lastan prelegon dum la 109a UK, sed funde tuŝita de la neegaligebla etoso dum la tuta kongresa semajno, li esprimis sian ravitecon viziti afrikon, kontinento kiu

eĉ en sia persona vivo havas tre grandan konsideron kaj estas parto de sia sio, ĉar parto de sia frataro venas el Afriko. Ne indas nur substreki tiun familian ligitecon al afriko, sed kiel kongresano kaj nuna prezidanto de UEA, li tre fieris pro la sukceso de tiu kongreso kiu donis neantaŭimagitan rezulton kun multe da raviteco de ĉiuj

kongresanoj. Tion eblas legi ankaŭ en la kongresa rezolucio, kiun voĉlegis s-ro Espoir Ngoma Kasati.

Jen Espoir Ngoma Kasati en okulvitroj kun sia amiko el Eritreo, estis surprize ekscii ke en Eritreo estas esperantisto, kio iel aparte pruvis, ke la afrika esperanto-movado estas sufiĉe progresanta.

Kongresa rezolucio

La 845 partoprenantoj de la 109a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Arusxo, Tanzanio, inter la 3a kaj 10a de aŭgusto 2024, traktis la temon « Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo ». La partoprenantoj el 66 landoj de la mondo, ne nur diskutis la temon, sed ili samtempe prezentis modelon por pli bona mondo, en kiu homoj el multaj diversaj landoj povas interkomuniki sen tradukistoj per la internacia lingvo Esperanto, kiun ĉiuj kongresanoj parolas. Kun ĝojo la partoprenantoj konstatas, ke tiu unua Universala Kongreso en Afriko plene sukcesis. Gxi pruvis ke la Esperanto-movado en Afriko estas vigla kaj aktivas en multaj landoj de la Afrika kontinento; la Afrikaj esperantistoj liveras valoran kontribuon al la universaleco de la tutmonda Esperanto-movado. La partoprenantoj de la kongreso observas kun ĝojo, ke multaj junaj homoj en afrikaj landoj lernas Esperanton en kursoj kaj ke en multaj Afrikaj landoj estas planite organizi pli da kursoj por ebligi al pli da homoj personajn internaciajn kontaktojn per Esperanto.

La kongresanoj alvokas al ĉiuj homoj protekti la medion, ĉar sana medio estas antaŭkondiĉo por atingi la celon konstrui pli bonan mondon. Ili alvokas al la partoprenantoj kaj al ĉiuj homoj de la tero utiligi dum vojaĝoj transportilojn kiuj konsumas nur malmulte da energio, prefere el daŭripovaj fontoj kiel suno aŭ vento. La kongresanoj konstatas kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, kiu ebligas kontaktojn inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj en Orientafrika Komunumo (OAK) sen devi uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas subtenon kaj necesas agnoski la lingvajn rajtojn de ties parolantoj, aparte en baza edukado, koresponde kun la rekomendoj de Unesko. Tio estas bazo por paco, por pli bona mondo. Por tutmonda interkompreniĝo necesas komuna neŭtrala internacia lingvo, kiun ĉiu homo povu paroli apud sia gepatra lingvo. La kongresanoj konstatas kun ĝojo kaj fiero, ke ankaŭ en tiu ĉi kongreso evidentiĝas, ke Esperanto plene taŭgas por tiu celo.

RONDVOJAĜO EŬROPE

Okazis du sinsekvaj sukcesoplenaj jaroj en la esperanto-agado en Afriko. Unuflanke temas pri la sukceso de sino Ranja Lydie ZAFINIFOTSY kiel gajninto de la konkurso partoprenu IJKn – 2023 kaj partopreno en la 108a UK en Italio de membroj de Loka Kongresa Komitato de la 109a universala kongreso de esperanto okazinta en Aruŝo/Tanzanio,

tiel inkluzivante la partoprenon de tri membroj de la afrika kongreso de esperanto samjare en la sama kongreso; aliflanke la sukceso de tute unua UK en Afriko kaj elektiĝo kiel gajninto de la konkurso partoprenu IJK-n 2024 de s-ro Espoir Ngoma Kasati, kiu sukcese rakontas sian sperton movadan en ĉi tiu numero.

RESTADO EN SVEDUJO



Post UK en Aruŝo, pluan tagon mi kunvojaĝis kun Martin Strid al Svedujo laŭ jena itinero : Aruŝo – Zanzibaro – Adisabebo – Stokolmo. Ni alvenis matene en Arlanda flughaveno la 12an de aŭgusto, sed ne estis tempo ripozi. Nuna loĝanto de Borlänge sed iam stokolmano, mia kunvojaĝanto ĉiĉeronis min tra tiu belege pitoreska urbo dum almenaŭ ok horoj ĝis kiam tempis entrajniĝis al lia loĝurbeto, en Stokolmo ne renkontis kun iu

esperantisto loka. Alveninte, nin gastigis ĉarmega virino, estis la Edzino de Martin. En amikega enfamilia etoso, mi pasigis tie du plenajn tagojn kun vizitoj en lokaj arbaroj esplorante la tipe svedajn arbarojn.

La 14an ni enbusiĝis tuta familio direkte al Gotenburgo kun taga halto en Udenäs ĉe Anita Dagmarsdotter Panjo de Stella Lindblom.

Je noktomezo mi alvenis en la urbeton Gråbo kie loĝas Siv Burell. Pluan tagon, la 16an de aŭgusto ni vizitis la gotenborgan klubon, ĉeestis apenaŭ deko da esperantistoj. Mi kaj Martin Strid estis honoraj membroj, kiuj venis el UK. Ni prelegis pri okazaĵoj de UK, poste estis momento promeni tra Gotenburgo.



Unue direktiĝis al Esperanto-Plasten kie esperantumante havis tagmanĝon, faris fotojn, babilis kaj en la plej granda rivero Göta älv de suda Svedio ŝipe promenis. Post vizitado en pluraj vidindegaj urbaj lokoj, ni posttagmeze revenis hejmen sed kun Siv Burell heltis ĉe la Biblioteko Stannum, kiun mi vizitis samtage. Venontan tagon tio estas la 17a de aŭgusto flumatene, mi devis forflugi al Litovio por la internacia

junulara kongreso. Laŭplane tiel frue kiel konsilinde, mi estis en la flughaveno gotenburga kaj flugis al Kaŭnas, je la 8a matene mi alvenis. Komenciĝis mia busa vojaĝo tra la lando de pluvoj, Litovio. Al la kongresejo mi alvenis malfrue vespere la 17an de aŭgusto, morgaŭo estis tago por la komenco de la kongreso en Ŝvenji, insuleto inter la rivero Ŝventoji kaj la Balta maro.

MIA UNUA IJK

Tiu junulara kongreso estis mia unua kaj mi estis la sola afrikano en la kongresejo kaj la unua alveninto por kongresi. Mi spertis lingvan problemon ĉe mia alveno, preskaŭ ĉiuj preferis paroli litove kaj tre malmultaj homoj kiujn mi renkontis en la urbeto Ŝventoji

kaj ĝenerale en Litovio. Alia problemo estis pro loka valuto; malsukcesinte ŝanĝi dolarojn al eŭroj en Svedio pro la postulo ŝanĝi al la svendaj kronoj unue kaj poste al eŭroj, ne volis kaj gardis dolarojn kun espero ŝanĝi en Litovio, sed ne sufiĉis tempo pro busado kaj

bedaŭrinde en Ŝventoj ne estas monŝanĝejo kaj mi ne havis surloke VISA-karton. Sed tempo pasis kaj venis aliaj kongresanoj kiuj havis

dolarojn el Usono kaj aliajn el Svedio havis bonvolis preni la havitajn svedajn kronojn de mi. Mi tre scivolis pri la programo kaj ĝenerale pri la evento.



Ju pli alvenadis aliaj kongresanoj des pli mi eksentis min multe pli hejme. Komenciĝis la kongreso post la solena malfermo.

Eŭropaj landoj ne ĉesis surprizi min. Ne nur pro la evoluintaj infrastrukturoj, sed ankaŭ pro kulturo kaj vivstilo. Estas tie, kie mi komprenis, ke ne valoras la penon saluti homojn en Eŭropo, estas por ili tempoperdo, sed en Afriko male estas deca konduto, unue saluti eĉ se oni ne konas unu la alian. Krom la tre alloga ĉirkaŭo, interesaj homoj kaj prelegoj, amuzis min la tipe litova malvarma bunta supo. Komence ŝajnis al mi neinteresa, malbelaspekta eĉ ne trinkinda supo, sed gustuminte, mi trovis ian tre eksterordinaran bongustecon en tiuj tipaj supoj. La Litovoj regalis nin per diversaj pladoj dum tuta semajno, mi devis atendi manĝaĵan surprizon ĉiutage. Survice, kiel ĝirafo, ĉiam emis hisi mian kapon



por povi malkovri la surprizon en la litovaj pladoj. Menciindas ankaŭ la alveno de litovaj tradicia koruso plena de virinoj, kiuj posedan tiel najtingalecan voĉon, ke eĉ serpentoj aŭdintaj tiun voĉon emis eliri el siaj subteraj fosaĵoj por povi spekti tiujn bele kantantajn gekorusanojn. Mi vagadis en senfina maro da etoso neforvelkiĝema dum tuta bonega

semajno. La IJK-programo estis parte distra parte kleriga, efektive taŭga por feriantaj junuloj. Mi prelegis pri pigmeoj kaj ankaŭ lernis multon interalie dancojn, informatikajn konojn

akiris, ... Sed IJK ne estis la tuto, rezervis al mi multe da vidindaĵoj de litovio, kiujn mi vizitis post la junulara kongreso.

Espoir Ngoma Kasati

Granda evento en nia klubo

Unuan fojon dum 101-jara historio de Esperanto en nia klubo gastis esperantisto el Afriko! S-ro Espoir Ngoma Kasati venis el DR Kongo kaj la unuan fojon en lia vivo li vizitis Eŭropon. Ni estis tre ĝojaj la renkontiĝon kun li en nia E-klubo REVO! Tiukaze en la klubo ni organizis



Afrikan tagon : prezidantino Vida Kulikauskiene vestiĝis per donacitaj afrikaj virinaj festaj vestaĵoj, ni lernis iomete la svahilan lingvon. En Afriko tio estas internacia lingvo, kiun parolas multaj popoloj en la kontinento. Espoir instruis svahil-lingve kanti bonvenigan kanton : "Jambo bwana". Vicprezidantino de la klubo Danutė Kriščiūnienė regalis ĉiujn per tradicia litova somera rozkolora malvarma supo-barĉo. Estis interese kunveno!

Vida Kulikauskiene, el Litovio

Vizito en Kaŭnas

La 29an de aŭgusto ni daŭrigis nian promenadon tra Litovio. Post vizito tra Anykščiai, la naskiĝurbo de la litova literaturo, ni rekte iris al Kaŭnas kie mi devis forveturi al Aŭstrio, gastigis nin s-ro... la sekretario de la Litova Esperanto-Asocio. Post iom da ripozo jam vespere, ni komencis nian ĉirkaŭviziton tra la urbo. En granda surprizo, ni iris ĝis la iama loĝdomo de la bopatro de LL Zamenhof sur la strato L.L. Zamenhof. Eluzis mi tiun oportunan momenton por ĉirkaŭrigardi tiun nomon kie naskiĝis esperanto, kvarope, ni ĝojegis esperantumi en tiu nokto en tre taŭga



loko. Ni vizitis muzeon de diabloj. Iom timiga kun pluraj kolektoj da diabloj el ĉie tra la mondo, eĉ el afrikoj.

Espoir Ngoma Kasati

RESTADO EN AŬSTRUJO



La 31an de aŭgusto je tagmezo el Litovio tra Polando kaj Ĉeĥio mi alvenis en Viena Centra Trejn-stacio (Wien Hauptbahnhof aŭ Wien Hbf), tie atendis min tri geesperantistoj interlie : Alfred Heiligenbrunner (prezidanto de la Aŭstra Esperanto-Asocio), Dodik Franziska kaj Geidel Franz Joseph

Same kiel en la antaŭe vizititaj landoj, la esperantistoj proponis al mi duhoran viziton tra la urbocentro de Vieno antaŭ iri ripozi en Lasseo, vilaĝeto je kelkaj kilometroj for de Vieno. Eĉ laca, mi ĝuegis mian vizitadon tra Vieno, plej grave estis viziti la Zamenhofan monumenton kaj la Kastelon Belvedere.

Postan tagon ni vizitis la vilaĝan paroĥon, kies paroĥestro devenas de Niĝerio. Post la meso ni interŝanĝis angle trioje kaj estis ĝoja amika etoso. Kun Alfred ni havis dutagan viziton en Graz, dua plej granda urbo en Aŭstrio, kie ni trovis tre entuziasmajn aktivajn lokajn esperantistojn.

Revenis al Lasseo, kaj pluan tagon iris esperantistan kunvenon surloke. al Bratislavo, Slovakio por partopreni la Partoprenis maksimumehomoj, mi

konis la plejmulton el ili kaj ĉio pasis en tre amika etoso ĝis vespere ni revenis al Aŭstrio. Vendrede, la 5an de septembro Alfred ripozis, sed mi devis ĝui mian lastan tagon parte en Aŭstrio kaj ĝenerale en Eŭropo, min atendis en la trejn-stacio s-ro Franz, kiu ĉiĉeronis min denove tra Vieno por vizitis tre interesajn lokojn kiujn en la unua tago ne povis viziti. Pasigis kune tre memorindan belan tagon plenan da piedpromenado kaj foje prame iris, kunmanĝis picon kaj poste

reenpramiĝis al Wien Hbf de kie prenis pramon al Lasseo reen. La 6a de septembro estis tago por ripozi tutan antaŭtagmezon por rekolekti forton al longega forflugado al Etiopujo de kie mi flugis hejmen.

Mia restado en Aŭstrio estis sufiĉe mojosa, ĝojiga; kvankam dum tiu tuta tempo devis vivi vegane pro Alfred, sed tamen tio neniel ĝenis min ĉar en mia propra lando foje manĝas vegane krom tio, ke homoj ne tiom zorgas pri dieto.

KIEL KANDIDATI POR ŜENGENA VIZO ?

En ĉi tiu artikolo, mi rakontas pri mia sperto.

Akirado de vizo estas unu el la plej tikla afero ade diskutata sed neniam solvon trovas ĉar tio ne dependas de la esperantisteco nek iel ajn rilatas al Esperantismo, estas diplomatia afero. Sed konsiloj pri akirado de vizo povas helpi al multaj. Unue mi danku jenajn homojn ĉar ili multe, tre konstante konsiladis min pri diversaj etapoj, pri la tuta proceduro koncerne vizojn : Arya Ferduzi, Emile Malanda kaj Mirejo Grosjean.

Mirejo Grosjean donis al mi bruŝureton entenantan konsilojn pri decidoj de ambasadoroj rilate vizon, Arya Ferduzi, laboristo en la Belga ambasadejo en Indonezis helpis plenigi la virtualan vizo-formularon kaj helpis kolekti kelkajn dokumentojn provizendajn antaŭ kandidatiĝo kaj Emile Malanda helpis ankaŭ pri kongruigo kaj taŭgigo de dokumentoj.

Ja certe multaj afrikaj esperantistoj revas iam viziti Eŭropon aŭ partopreni esperantan eventon en Eŭropo, sed ĉiam estas problemoj pri vizo kvankam povas havi sufiĉe da rimedo por pagi mem la vojaĝkostojn, eble iam kandidatiĝis kaj estis rifuzita. Necesas ne koleri kvankam kortuŝe, sed necesas kontroli ĉu ĉiuj dokumentoj estis provizitaj kaj ĉu la celo de la vojaĝo estas klara ?

Jen miakaze kio okazis : mi kandidatiĝis por partopreni IJK-n en Litovio kun celo turismi antaŭ kaj post IJK. Estis de mi bezonita unu semajno en Svedio, du semajnoj en Litovio kaj unu semajno en Aŭstrujo. Ĉiuj tiuj ŝtatoj membras en Shengen-zono, unua avantaĝo! Scio pri internaciaj rilatoj unue inter la cellando kaj via propra lando estas grava, due scio pri kie situas la ambasadejo de la cellando en

sia urbo aŭ lando estas dua plej grava afero. Foje okazas ke la cellando ne havas nek ambasadejon nek konsulejon en via urbo aŭ lando, tiukaze serĉu en via lando la ambasadon kiu reprezentas la interezojn de via cellando en via lando. Sciinte tion post serioza esploro, petu la rendevuon pli frue, mi konsilas ses monatojn antaŭ via vojaĝo, tio permesos al vi kolekti ĉiujn dokumentojn. Certiginte pri jam akceptita rendevuo, la rendevuo akireblas rete, ekserĉu dokumentojn kaj la plej grava estas unue la formularo almetu sur la formularon vian plej freŝan pasportan foton. Elprintu la rendevuo-informojn, tie estas la numero de via formularo, do jam du dokumentoj : **rendevuo** kaj **formularo**.

Atestilo pri vakcinado kontraŭ kronviruso, por mi estis nepra. **Valida pasporto**. Tio estas la vojaĝdokumento liverita de la ŝtato de la vojaĝanto. Estas tre konvinke kiam la ambasadoro konstatas, ke la kandidato estas ofta vojaĝanto, tio senigos la dubojn ke tiu ne revenos al sia hejmlando, ĉar la ambasadoroj evitas kontraŭleĝajn enmigrintojn. Oni petas kopiojn de la du kopiojn de la unua paĝoj de la pasporto kaj du kopiojn de la du lastajn paĝojn de la pasporto. La celo laŭ mia kompreno estas, ke pri la kopio de la du unuaj paĝoj, oni volas certigi, ke la pasporto estas valida kaj tie kuŝas ĉiuj personaj informoj, do ĉio pri identeco de la kandidato; pri la du kopio de la lastaj paĝoj por certigi ke estas loko por surmeti la vizon. Krome

oni petas kopion de la paĝoj entenantaj sigelojn/vizojn por vidi ĉu vi ofte vojaĝas kaj kopio de ŝengena vizo se vi jam akiris ĝin por vidi ĉu vi iam estis en Eŭropa Unio/ Sengen-zono kaj revenis al via lando. Gravus la periodo de via restado kongrue kun la valideco de via pasporto, la celo de via vojaĝo kaj la flugbileto. Oni postulas la flubileton! Ne estas saĝe aĉeti ĝin antaŭ akiri la vizon ĉar kaze de rifuzo vi perdos monon, tiukaze faru rezervadon. Bedaŭnde nur la firmao komputilo de iu ajn flugkompanio povas fari la rezervadon la mia ĝisnuna scio se eblas alikaze, plej bone. Do necesas iri al flugkompanio por akiri taŭgan rezervadon. La datoj en via formularo, en la rezervado, en la sanasekuro kaj en la rezervado de via loĝado devas kongrui. Pri datoj gravas zorgi pri : Petita restadperiodo : miakaze estis bezonita 27 tagoj da restado en Ŝengena zono de la 11a de aŭgusto ĝis la 6a de septembro.

Sanasekuro : Same kovris 28 tagojn de la 11a de aŭgusto ĝis la 7a de septembro. Tio tre gravas ĉar mia sanasekuro estos valida eĉ se mi malsaniĝas en la flughaveno.

La rezervado de flugbileto : unue la rezervado montras la itineron. Due montras kiam vi alflugos kaj kiam elflugos. Mia forflugo de mia lando estis 11a de aŭgusto por alveni al Arlanda flughaveno en Stokolmo la 12an de aŭgusto. Kvankam mi forflugis de Tanzanio, estis grave diri ke mi flugos de mia lando, ĉar mi petas la vizon

estante en mia lando. La elflugo estis en la 6a de septembro, do kompare kun la sansekuro, mi havis du unu plian tagon por ne plu bezoni ĝin (la sanasekuron) ĉar tiam mi estos ekster la Eŭropo.

La loĝado ankaŭ estas grava indikante la precizajn datojn se vi loĝos en hotelo mendu ĝin aŭ rezervu ĝin. Se temas pri amika vizito, ekzistas taŭga retejo por invitleteroj, via gastiganto povas plenigi kaj submeti ĝin rete kaj poste sendi kopion al vi.

La invitletero : ĝi devas esti klara, preciza kaj subjektiva priskribante vian vojaĝon kun precizeco. Viaj nomoj devas aperi tiel, kiel aperas sur ĉiuj dokumentoj. Vojaĝplano kaj kiom longe vi restos en tiu lando. Al tiu invitletero foje estas konsilinde aldoni konteltirojn.

Pruvo de sufiĉa financa persona rimedo : kvankam via vojaĝo—kostoj estos plene kovritaj, viaj persona financa rimedo estas nepre pruvenda. Tio certigas, ke vi en via lando pagas impostojn kaj havas monon per kiu vivteni vin. Krome, pruvo de tiu havata

financa rimedo, kiu laboro generas tiun sumon, pruvo ke vi laboras.

Pruvo pri akceptita ferio : se vi estas laboristo vi devas peti ferion en via laborejo kaj/aŭ se vi estas studento, petu ferion en via universitato. En la letero pri ferio devas esti klaraj kaj precizaj viaj vojaĝo-celoj kaj vojaĝo-datoj kongrue kun la ceteraj dokumentoj.

Mi konstatis, ke tiuj dokumentoj devas ricevi vian absolutan atenton. Tiu listo ne estas plena, dependas de viaj vojaĝo-celo kaj cellando, vi povas provizi pliajn sed nepras ĉiam esplori kaj plej oportune estas iri al la ambasadorejo por peti tiun liston, kie estas ligiloj ankaŭ por aliaj laŭbezone kromaj provizendaj dokumentoj.

Tamen, necesas konscii, ke doni vizon al iu ajn estas decido de ambasadoro. Indas pretigi ĉiujn dokumentojn necesajn la tipo de via petita vizo kaj atendi la lastan decidon de la Ambasadoro.

Espoir Ngoma Kasati

NEKROLOGAJ INFORMOJ

Forpasis s-ro Jean-Bosco Malanda Lutete

(10an oktobro 1970- 26-an julio 2024)

Ni eksciis kun profunda malĝojo la forpason de s-ro Jean-Bosco Malanda, kiu mortis la 26an de julio 2024 en aĝo de 54 jaroj. Li estis multjara membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj novica aktivulo en Afriko.

Naskiĝinte la 10an de oktobro 1970 en Mbanza-Ngungu (DR Kongo), Jean-Bosco Malanda dediĉis parton de sia vivo al Esperanto. Li estis IKUE-reprezentanto por DR Kongo, membro de la Afrika Komisiono de UEA (2004-2005) kaj laste inter 2021 kaj 2024 prezidanto de Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA). Dum sia esperantista vivo Jean-Bosco ankaŭ partoprenis en multaj esperanto-



renkontiĝoj, el kiuj la 97-a UK 2012 en Hanojo (Vjetnamio), la 48a ILEI-kongreso 2015 en Ostendo (Belgujo) kaj la 100a UK 2015 en Lillo (Francio)

Laŭprofesie, Jean-Bosco estis ankaŭ konata kiel projektmastrumanto kaj socialhelpanto post studoj ĉe la Mbanza-Ngungu-instruista kolegio (1994-2000)

kaj universitataj studoj pri administrado (2009-2011) ĉe IFGC/Kinŝaso.

La entombigo okazis la 17an de aŭgusto 2024 ĉe la tombejo Nécropole Mwakasa, kie kunvenis membroj de lia familio, geamikoj, kolegoj, esperantistoj por honori lian memoron per kortuŝaj atestoj.

Via memoro por ĉiam estos en nia koro.

Ripozu en paco, Jean-Bosco!

Forpasis s-ro Augustin Mbomba Kuluba

(1959-2024)



La 29an de aŭgusto forpasis s-ro Augustin Mbambo Kuluba unu el la plej malnovaj pioniroj de Esperanto en Uvira/DR. KONGO. Li estis esperantisto ekde la jaro 2000 kaj agadis kiel esperantista instruisto. Li estis civitano, delegito de la Uvira societo UEDU ĉe la Forumo de la Esperanta Civito. Li regule partoprenis la

esperantologiajmn semajnojn ĉiujare organizatajn de Kultura Centro Esperantisto. Lia morto okazis subite.

Ni kondolencas lian tutan familion!

Ripocu en paco, karega Augustin Mbomba Kuluba!

EN NANDI HILLS, ESPERANTISTOJ KUNVENIS

La 6an de aŭgusto 2024 en Nandi Hills, Kenjio en la loĝejo de Abraham Korir kunvenis Kenjaj esperantistoj, raportas Andrew Misoi, la sekretario de la grupo.

TAGORDO

Konscio de drogo kaj substancioj

La renkontiĝo komenciĝis per diskuto pri konsciigo pri la



danĝeroj de drogo drogiĝemo.

Membroj jesis organizi komunumajn atingoprogramojn por eduki la junulon pri damaĝaj efikoj de la drogo. La klubo kunlaboros kun lokaj lernejoj kaj religiaj institucioj por disvastigi ĉi tiun konscion. Aldone, estis diskutite kiel la klubo povas serĉi subtenon por presi aŭ marki t-ĉemizojn, kiujn membroj portos dum disvastigaj agadoj por pledi por konsciigo pri drogoj kaj drogiĝemo. Tiuj t-ĉemizoj inkluzivos ankaŭ la esperantan emblemon reklamante kaj lingvon kaj la aferon.

Lernado de esperanto

Oni diskutis pri la graveco progresigi la lernadon de esperanto ene de la kimunumo. Membroj estis instigitaj partopreni retajn kursojn kaj praktiki la lingvon regule dum klubo-kunvenoj. La klubo

konsentis organizi laborrenkontigojn por instrui novajn lernantojn plifortigante iliajn esperanto-kapablojn.

Membriĝo al UEA/TEJO

La grupo emfazis la bezonon ke ĉiuj membroj membriĝu al UEA/TEJO por subteni la tutmondan esperanto-movadon kaj akiri la avantaĝojn de la internacia interkomunukado. Membroj estis instigitaj efektivigi siajn aliĝojn al UEA/TEJO antaŭ la fino de la jaro.

Lanĉo de maŝinoj por valoraldono de bambuo



La klubo ricevis novajn maŝinojn de eŭropa partnero por subteni la aldonan valoron de bambuo. Ĉiuj maŝinoj estos uzataj por krei bambuajn produktaĵojn kiel meblojn, ornamaĵojn kaj aliajn

utilajn aĵojn. Abraham Korir, la grupo-prezidanto, rimarkigis, ke la maŝinoj multe plibonigos la efikon de la bambua projekto kreante pli da enspezo kaj ŝancojn por la komunumoj.

Daŭranta metiejo-konstruado

La konstruado de la metiejo kie la bambua prilaborado okazos daŭras. La instalaĵo ne nur helpas en la aldono de bambuo, sed ĝi servos ankaŭ kiel spaco por interago kun la lingvo esperanto por komunaj agadoj kaj promenoj. La laborrenkontiĝo estos plia avantaĝo por la klubo kaj ŝlosila valorajo por la kenja esperanto-movado. Membroj esprimis ravitecon pro la potencialo por pligrandigita produktado, trejnadoj kaj reklamado de esperanto.

Farado de esperanto-flago

Okazis diskuto pri elfarado de esperanto-flago por la esperanto-klubo de Nandi Hills. Membroj konsentis esplori la dizajnon kaj specifajojn por la esperanto-flago, kiu estos loke farita. Tiu ĉi flago estos uzata dum renkontiĝoj por reklami la identecon kaj

engaĝiĝon de la klubo al esperanto-movado.

Konkludo

La renkontiĝo finiĝis kun sindevontigo de ĉiuj membroj al siaj respektivaj taskoj inkluzive de la aliĝo al UEA/TEJO, antaŭenigo de la bambua projekto kaj konsciigo-kampanjo pri

sindrogado. La venonta kunveno estis planita por revizii la progreson de la laborejo-konstruado kaj finpretigi la detalojn por la esperanto-flago. Aldone, membroj antaŭenigos kun la marko de t-ĉemizoj, kiuj prezentos kaj kontraŭdrogan mesaĝon kaj esperanto-emblemon.

Listo de partoprenantoj :

Abraham Korir (prezidanto), Andrew Misio (Sekretario), Frederick Chumba (kasisto), Ŝila Chalagat, Geoffrey Musidia, Prodenia Mitei.

Raportis,

Andrew Misio.

RAPORTO DE LA 5-A DE OKTOBRO



La 5an de oktobro en la klubo de Muramvya, lernantoj lernis :

Resumon de pasintaj lecionoj, alfabeton de esperanto, kantojn esperantajn, la subjekton, posedajn pronomojn.

En nova klubo de Muramvya, ni vin informas ke ni havas multajn lernantojn tra skolta movado.

Petoj

Por plibonigi la instruadon, ni bezonas kelkajn materialojn :

- Du skatolojn da diverskoloraj kretoj,
- Registrolibron,
- Skribilon,
- Programon pri muntado de filmetoj prefere Adobe premier pro aŭ filmaparaton (kamaraon)

Esperante bonan respondon al nia peto, estimataj estraranoj de ANEB, TEJO, ILEI kaj UEA bonvolu akcepti nian peton!

Raportis,

**Respondeculoj pri la instruado, s-ro NZISABIRA Leonard kaj
NIHEREWENIMANA Richard.**

GRAVA INTERVJUO



La Estrarano de UEA pri Afriko estis intervjuita de la redaktoro de la revuo Esperanto en Afriko pri liaj impresoj kaj perspektivoj rilate al UK en Afriko. Jen estas la intervjuo ĉisube :

Unua demando : *“kial denove okazigi UK-n en Afriko?”*

Jérémie Sabiymva : La unua UK en Afriko lasis grandan impreson; kaj surprizon flanke de partoprenintoj. Kiel vi mem povis rimarki, ne estis multaj partoprenintoj eksterafrikaj kompare kun aliaj UK-j, ĉefe tiuj, kiuj okazas en Eŭropo. Mi komprenas tiun heziton, kiu estis en kelkaj esperantistoj, ĉar temas pri unua sperto kaj nur kuraĝuloj povis veni. Mi ĝojas ke ĉio sukcese okazis kaj raportoj estas pozitivaj, tio instigos al homoj, kiuj havis dubon ankaŭ veni al Afriko, eĉ ekster UK, eble en Afrikaj kongresoj aŭ regionaj /landaj kongresoj. Jes, estis riska

UK, ni konsciis pri tio ekde la komenco sed indas organizi ĝin kaj se ni komparas la malavantaĝojn kaj avantaĝojn, certe UK denove revenos en Afriko. Afriko estas tre bona grundo por semi nian lingvon kaj UK ege gravas por gardi esperantistojn en la movado. Nun jam sentiĝas la efiko de UK, okazas kunsidoj; renkontiĝoj, plimultiĝis kursoj ekde septembro, mi ricevas multajn mesaĝojn de esperantistoj, do tio estas bona signo ke UK venis veki nin. Do indas denove kongresi en Afriko sed tio dependos de la matureco de niaj landaj asocioj.

Esperanto en Afriko : *kiel Estrarano de UEA pri Afriko, kiaj estis viaj impresoj dum UK en Aruŝo kaj kompare kun la jam okazintaj, kiujn vi persone partoprenis, kiel vi povas taksi la tute unuan UK-n en Afriko?*

Jérémie Sabiymva : kiel estrarano de UEA, tiu UK estis sukcesa kaj ni ne antaŭvidis tiun sukceson. Unue mi ĝojas ke multaj afrikanoj povis partopreni, kaj multe dankas al ĉiuj, kiuj iel kunlaboris. Ĉio ne

estis paradiza; ni vidis kie plibonigi kaze ke UK denove revenos al Afriko. Tamen, ĉie ne ĉio bone funkcias, ĉiam estas malbonaj flankoj. Mi dirus ke la unua UK estis unika sperto, kaj en ĝi okazis ankaŭ kelkaj novaĵoj, kiel landaj salutoj, bankedo kiu estis malfermita al ĉiuj, multaj ekskursoj, grandega kontribuo de afrikanoj....

Esperanto en Afriko : *“Ni vidis, ke multaj afrikanoj ĉefe junuloj partoprenis la 109an UK-n en Aruŝo, ĉu vi pensas ke tio havos bonajn rezultojn por la Afrika E-movado poste kaj laŭ vi, kiamaniere UEA povas teni tian progreson en Afriko?”*

Jérémie Sabiymva : En Afriko, multaj esperantistoj estas junaj, do bona tereno por TEJO kaj tio ankaŭ iel junigis nian UK-n. Mi bedaŭras ke ni ne sukcesis konvinki TEJO-n kaj ILEI-n veni ankaŭ en Afrikon por kunigi ĉiujn aranĝojn en la regiono kaj doni okazon al niaj aktivuloj resti longe en kontakto kun Esperanto. Tamen, mi forte esperas ke ĉi UK iel plifortigis la senton en niaj aktivuloj, kaj malfermis al ili multajn oportunojn.

Kiel UEA povas teni la progreson?

Unue dependos de afrikanoj mem ; UEA venas subteni iniciatojn de lokanoj ; do la laboro revenas al Afrika Komisiono kaj aktivuloj, kiuj devus bone ludi la kunordigan rolon, por profiti maksimumon de UK. Nun ekvenas projektoj ; ekzemple de Burundo, Kenjo kaj Gambio. Ni esperas ke eĉ aliaj vekiĝos por tiri profiton de la UK. La projekto ni semas estas je nia dispono por helpi al niaj aktivuloj havi financojn por etaj projektoj, kiuj antaŭvidas progreson.

Esperanto en Afriko : “*Kiel vi antaŭvidas la partoprenon de Afrikanoj en la venonta UK en Brno?*”

Jérémie Sabiymva : kiel vi scias, partopreni en UK estas granda lukso, sed estas multaj problemoj kiujn afrikanoj alfrontas : financajn kaj administrajn. Brno estas en Eŭropo kaj vi scias kiel mi, krom la kosto, ke staras vizaj baroj. Jam aliĝis ses afrikanoj kaj certe aliĝos pli ĉar multaj nun ŝparas por partopreni sed la demando estas ĉu ili ricevos vizon ? Mi timas ke ne ricevo de vizo iel malkuraĝigos ilin. Tamen, daŭre restos la konkuro Partoprenu UK-n, kaj meritoplenaj

kandidatoj havos okazon partopreni UK-n, sed mi forte instigas tiujn, kiuj povas kovri siajn elspezojn aliĝi kaj partopreni.

AFRIKA KOMISIONO DE UEA

La redakcio anoncas

Esperanto en Afriko estas dumonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko

Redaktis : Espoir Ngoma Kasati, Lubumbashi, DR Kongo; tel : +243 972 716 042, B.P:1023.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka esperanto-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolo(j)n pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ surpaperigitajn artikolojn.

Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj, por la plibonigo de la bulteno al : espoirkasati@gmail.com

Limdato por la 51a n-ro : la 30an de decembro 2024.

Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2022-2025)

S-ro Aimé-Patrick MANIRAKIZA,
Burundo

S-ro Koffitche Koufionou
Togolando

S-ino Miora Raveloharison,
Madagaskaro

**S-ino Ranja Robertine Jean d'Arc
Zafinitots,** Madagaskaro

S-ro John E. Mageesa, Tanzanio

S-ro Espoir Ngoma Kasati, DR.
Kongo

TABELO DE ENHAVO

ENKONDUKO.....	2	RESTADO EN SVEDUJO.....	20
GRANDA SUKCESO.....	3	MIA UNUA IJK.....	21
VIRINA KONGRESO EN ARUŜO/TANZANIO.....	4	Granda evento en nia klubo.....	23
DUA AKVoj.....	4	Vizito en Kaŭnas.....	23
Nia programo.....	5	RESTADO EN AŬSTRUJO.....	24
Prelegoj kaj kundividoj.....	5	NEKROLOGAJ INFORMOJ.....	27
Lernado de dancoj, artaj atelieroj, plivigligado kaj lingvoinstruado kaj ekskurso.....	6	Forpasis s-ro Jean-Bosco Malanda Lutete. .27	
UNUAJ TAGOJ DUM UK EN ARUŜO.....	7	Forpasis s-ro Augustin Mbomba Kuluba...28	
LA SOLENA MALFERMO.....	9	(1959-2024).....	28
AFRIKANOJ KAJ PROGRAMEROJ.....	9	EN NANDI HILLS, ESPERANTISTOJ	
Instruado de la svahila.....	9	KUNVENIS.....	29
Kurso por progresintoj.....	10	TAGORDO.....	29
PAROLI LANGOLE.....	10	Konscio de drogo kaj substancoj.....	29
Artikolo pri langolaj minuskloj.....	10	Lernado de esperanto.....	29
JUNULARA PROGRAMERO DUM UK EN ARUŜO.....	12	Membriĝo al UEA/TEJO.....	30
RAPORTO PRI LA 54A INTERNACIA		Lanĉo de maŝinoj por valoraldono de bambuo.....	30
INFANA KONGRESO.....	14	Daŭranta metiejo-konstruado.....	30
VIZITO ĈE MASAJA VILAĜO.....	16	RAPORTO DE LA 5-A DE OKTOBRO.....	31
SOLENA FERMO.....	18	GRAVA INTERVJUO.....	32
Kongresa rezolucio.....	19	AFRIKA KOMISIONO DE UEA.....	34
RONDVOJAĜO EŬROPE.....	20	La redakcio anoncas.....	34
		Membroj de la Afrika Komisiono de UEA. 35	
		TABELO DE ENHAVO.....	35